

Edmond Privat : *Interpopola Konduto*, 9-a parto
Konkludoj

Claude Gacond, 381-a radioprelego, 1971.01.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas la studadon de la bedaŭrinde elĉerpita verko de Edmond Privat : *Interpopola Konduto*.

A.- Multaj ĉapitroj el tiu verko konservis sian aktualecon. Ili povus esti represitaj fotokopie. Ili ĉefe troviĝas en la komenco kaj en la fino de la libro. La mezaj ĉapitroj estas malpli teoriaj. Ili provas apogi la teoriajn observojn per historiaj faktoj. Kaj Edmond Privat, kiel bona ĵurnalisto, provis prezenti aktualaĵojn.

Cl.- Hodiaŭ tiuj aktualaĵoj fariĝis historiaĵoj. Pro tio, kio en 1931 povis esti simple aludata, bezonus en 1971 pli detalajn klarigojn. Aŭ, kio estus pli bone, reeldonanto devus havi la kuraĝon anstataŭi la faktojn aktualajn en 1931 per paralelaj faktoj aktualaj por legantoj vivantaj en 1971.

A.- Tiun laboron ni ne estas kapablaj fari. Pro tio ni rapide pritraktos tiun mezan parton, kiu tamen estas tre grava, se oni volas malkovri la socian personon de Edmond Privat. En ĝi li parolas pri la sociaj kaj neperfortaj luktoj ; pri la laboristaj movadoj kaj iliaj ribeloj ; pri la krizoj en la socialistaj rondoj, kiam oni devis elekti inter la klas-solidareco aŭ la nacia solidareco ; pri la luktoj de la koloniaj landoj kontraŭ la regantoj ; pri la elekto inter perforto aŭ neperforto, kiam lukto estas necesa.

Cl.- Tiuj ĉapitroj donas klaran panoramon pri la sinteno de Edmond Privat rilate al la ideologiaj problemoj propraj al la generacio de 1930. El ili ni povus ĉerpi tekstojn, kiuj permesus redakti prelegojn, kies titoloj povus esti : Edmond Privat kaj la koloniismo ; Edmond Privat kaj la komunismo ; Edmond Privat kaj la klasa konscio ; Edmond Privat kaj la neperforto, kaj tiel plu, kaj tiel plu.

A.- Tiuj ĉapitroj estos ege utilaj al historiisto, kiu verkos biografion pri Edmond Privat. Jen ne estas nia celo. Pro tio ni saltas al la fino de tiu verko *Interpopola Konduto*, kvankam multaj paĝoj de la meza parto estus citendaj.

Cl.- Sed citadoj devus esti ĉirkaŭataj de tro multe da klarigoj por konveni al mallongaj prelegoj. La forigo de tiuj klarigoj riskus doni falsan lumon pri la ege kompleksa penso de la biografo de Zamenhof kaj Gandhi.

A.- La esperantistoj nur sciu, ke en Edmond Privat ili tutcerte havas gravan pensulon. La tekstoj, kiujn ni legis al vi dum la pasintaj semajnoj, vin certe konvinkis, ke la studo de la penso de Privat estas inda de gimnazia instruado. Kiam esperanto estos instruata en la gimnazioj, ni esperas, ke la instruistoj havos la kuraĝon kaj objektecon turni la rigardojn de siaj gelernantoj al la verkoj de Edmond Privat.

Cl.- La studentoj trovos en la verkaro de Edmond Privat materialon por multaj literaturaj kaj filozofiaj studoj kaj eseoj. Edmond Privat ne ankoraŭ ĉesis paroli.

A.- La stilo de Edmond Privat celas tujan komprenon. Pro tio la frazoj estas ĝenerale ege mallongaj. Pro tio laŭtleĝo estas sufiĉe facila. Pro tio asertoj gravuriĝas en nian memoron kaj en la memoron de la aŭdantoj. Por tamen legi ion en tiu meza parto de *Interpopola Konduto*, ni nun legos al vi kelkajn asertojn aŭ konstatojn de Edmond Privat :

Cl.- *Perforto naskas perforton kaj blindan malspritecon.*

A.- *Atenton vekas la rusa revolucio pri sia teknika provo, la hinda pro sia etika eksperimento. Fakte montriĝas noveco teknika en ambaŭ. Kio estas nova en Ruslando, tio estas celo. En Hindujo la rimedo.*

Cl.- *Ankoraŭ longe la homaj aroj devos batali por justeco kaj libereco. Ne mankos okazoj de konfliktoj. Se l' abomeno pri la milito kaj la ekzemplo de Hindujo iom post iom gvidus ilin al malsama kutimo kaj al alia metodo ol milito, ĉu ili ne estus lernintaj unu el la plej grandaj instruoj de historio kaj prahistorio ? Ĝi estus trovaĵo ne malpli grava ol la lerno pri fajro.*

A.- *Unu geniulo provas gasojn, alia ne-perforton. Ĉiu laŭ sia prefero.*

Cl.- *Al Francujo en Sirio kaŭzis plimultajn amikojn ĝiaj lernejoj antaŭ la mondmilito ol ĝiaj regimentoj poste.*

A.- *Malfido estas detruilo por ĉiu societo. En ordinara vivo, sur la stratoj iradas grandega plimulto de homoj sen ia armilo en la poŝo. Ĉar ili ne kunportas mem revolverojn, ili ne imagas, ke la ceteraj pasantoj agas malsame.*

Cl.- *En Ruslando la imperiestroj tenis ĉirkaŭ si multegan policaron. Tamen unu post alia caro falis mortigite. Ĉie oni vidis uniformojn tie. Tamen ne trankvilaj sin sentis la vizitantoj.*

A.- *Internacia sekureco, en formo de popola sento, kreskas nur el kutimiĝo al solvo de konfliktoj per tribunalo, el sperto pri militoj evititaj, el konfido kaj kontrolebla senarmigo. Ĉia malfunkcio, ĉia malfido, ĉia minaco, ĉia ultimato, ĉia paniko refortigas la malan senton pri danĝero, ankoraŭ la pli fortan sur tiu interŝtata kampo.*

Cl.- *Per tiuj kelkaj asertoj de Edmond Privat ni alvenis al la antaŭkonkluda ĉapitro, kies temo estas tre interesa por ni esperantistoj, ĉar en ĝi Edmond Privat parolas pri la senmistika Ligo de Nacioj kaj pri la mistiko de la esperantistoj.*

A.- *La venontan semajnon ni legos al vi erojn el tiu ĉapitro, kies titolo estas *Novaj Mistikoj*.*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*

-oOo-